# BRAZILA ESPERANTISTO

55-A. JARO — JANUARO-MARTO 1961 — N.º 562-564

## PROF. D-RO GIORGIO CANUTO



*D-ro Giorgio Canuto prezidas la Italan Esperantan Kongreson (Firenze 1959) dum la brazila reprezentanto, D-ro Luís de Azeredo Coutinho salutparolas.* *(Teksto sur paĝo 5-a).*

**ALIĜU AL LA XVII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO!**

JANUARO-MARTO 1961

55-a Jaro N.º 562-564

# BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")
Oficiala organo de

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:
**A. CAETANO COUTINHO**

Respondeca redaktoro (redactor principal):
**D-ro CARLOS DOMINGUES**

Administracio kaj Redakcio:
**Praça da República, 54, 2.º**
Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio
RIO DE JANEIRO — BRAZILO

**Senpaga por anoj de B. E. L.**
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj

**QUOTA ANUAL DE ADESÃO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1961**

**(De acordo com os Estatutos todos os membros são automàticamente filiados à organização mundial)**

| | |
|---|---|
| Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto" ........ | 200,00 |
| Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista .................. | 600,00 |
| Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto" .................. | 1.200,00 |
| Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante ... | 1.800,00 |
| Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante ............ | 10.000,00 |
| Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante ....... | 24.000,00 |

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
**Rio de Janeiro, GB.**



*Foto pri la ferma solenaĵo de E.—kurso gvidita de Generalo Wanderley F. Gonçalves, ĉe Legio de Bona Volo, en Pôrto Alegre — R.G.S.*

# BRAZILA ESPERANTISTO

55-A JARO | JANUARO-MARTO 1961 | N.º 562-564

# CASTRO ALVES EM ESPERANTO

## PREFÁCIO DE *"ELEKTITAJ POEMOJ"*

Em Esperanto — na língua universal da fraternidade humana — as melhores poesias de Castro Alves adquirem uma fôrça nova: ajustam-se ao sonho ousado do *vate,* debruçado profèticamente sôbre o abismo dos séculos, sôbre os destinos dos povos. Poucos poetas, realmente, tiveram como êle a intuição do que viria, essa admirável antevisão do mundo lavado de luz, redimido dos velhos pecados da tirania e da estupidez, elevado soberbamente acima de seus alicerces animais, de suas bases históricas e selvagens, de sua rude e lastimável condição hereditária... com as asas que lhe deu o gênio, discípulo das dimensões dos mestres (que foram Lamartine, Vigny, Mickiewicz, Byron, Victor Hugo), angélico arauto das idades adivinhas, êsse jovem cantor de liberdades dominou a sua época e o seu mundo com a arte trovejante. Foi o lírico dos amores românticos o paisagista dos panoramas natais, o trovador das endeixas gárrulas em que trinava o coração adolescente.

Mas a ternura e o enlêvo que lhe dedilharam sorrindo as cordas eróticas da lira moça não perturbaram, no seu vôo celeste, a imaginação criadora: foi na realidade um precoce estadista de idéias cataclísmicas; à frente da transformação social, um semeador de revoltas rutilantes. Não se veja nas impaciências políticas do "poeta dos escravos" a angústia transitória de uma geração, a querer plasmar os acontecimentos à imagem das suas doutrinas. Não é aí o filósofo, à moda grega, pensando as suas quimeras nos pórticos da Academia, entre a oliveira platônica e a parreira socrática, no limiar da Estética e da Moral. É literalmente o varão bíblico, de sandálias viajeiras e cajado de pastor, vaticinando sob os muros de Babilônia a destruição da Iniquidade: com o senso hebraico (e a divina mensagem) dos santos videntes. Carregada desta responsabilidade utópica, a poesia de Castro Alves se equipara aos supremos documentos da literatura moderna. Tem o timbre equívoco das subvenções do espírito, e, ao mesmo passo, a luminosa inocência das confissões coletivas; a amargura e a alucinação das fantasias que inspiram os hinos, dos símbolos que fazem as lendas, dos clamores que criam as epopéias; a doce persuasão do bem. O seu otimismo veste-se das côres verde-e-amarelas do patriotismo; mas para além da terra que amanhece, deslumbrava-o o universo unificado nos direitos do homem, a conciliação

futura das raças e dos idiomas, na grande Paz da inteligência. É a sensação eufórica dêsse fim necessário — a Ordem de Deus no progresso livre — que vibra longamente nas suas estrofes de castigo e de perdão, de ufania e de remorso, de serenidade e de indignação, de clemência e de fúria, de crepúsculo e de madrugada, de humildade e de infinito. Requeriam um idioma diferente. Por sôbre a torre de Babel, das línguas restritas, a torre de marfim, do ideal ecumênico. Em vez dos degraus de pedra, à beira do caminho, a escada de Jacó, subindo para as estrelas. Não em palavras que se perdem, mas em écos que ficam. Vertidas na linguagem cósmica dos entendimentos definitivos, na eloqüencia absurda das almas que se pacificaram... Vão aqui em Esperanto em magistral tradução de Leopoldo H. Knoedt! E que desta forma, e nesta forma, a poesia do mais autêntico dos talentos liberais do Brasil ( sendo o mais primaveril e o mais puro) — fale e ensine aos homens do mundo todo a sua interminável lição de harmonia, candura e beleza, a sua imensa lição de equilíbrio e dignidade!

PEDRO CALMON

*Êste vibrante trabalho do eminente Acadêmico e Magnífico Reitor da Universidade do Brasil foi escrito especialmente como prefácio do livro* "Elektitaj Poemoj". *A obra editada pela Universidade da Bahia graças ao seu Magnífico Reitor, Prof. Edgar Rego Santos, contém as produções selecionadas por Homero Pires no livro* Poesias Escolhidas. *Leopoldo H. Knoedt traduziu fiel e admiràvelmente as poesias do imortal poeta. A versão do prefácio deve-se ao dedicado e competente samideano Antonio Caetano Coutinho. Ela reflete a eloqüência do original e demonstra mais uma uma vez a extrema ductilidade do Esperanto, que o torna incomparável instrumento como língua de tradução.*

*O livro, que assinalou ao mesmo tempo a passagem do centenário de Zamenhof, e a realização do XVI Congresso Brasileiro de Esperanto em Salvador, foi ofertado pela Associação Bahiana de Esperanto, promotora do Congresso a todos os membros efetivos dêste.*

# APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

## *LÍNGUA*

*Machado de Assis*

Entre os muitos méritos dos nossos livros, nem sempre figura o da pureza da linguagem. Não é raro ver intercalados em bom estilo os solecismos da linguagem comum, defeito grave, a que se junta o da excessiva influência da língua francesa. Êste ponto é objeto de divergência entre os nossos escritores. Divergência, digo, porque, se alguns caem naqueles defeitos por ignorância ou preguiça, outros há que os adotam por princípio, ou antes, por uma exageração de princípio.

Não há dúvida que as línguas se aumentam e adulteram com o tempo e as necessidades dos usos e costumes. Querer que a nossa pare no século de quinhentos, é um êrro igual ao de afirmar que a sua transplantação para a América não lhe inseriu riquezas novas.

*Terão os leitores interessados a tradução dêste trecho, no seguinte número desta revista.*

# GIORGIO CANUTO

En la fino de Oktobro de la pasinta jaro la tuta esperantistaro ricevis dolorigan sciigon: la Prezidanto de U.E.A. mortis. La detalaj raportoj de tiuj, kiuj kunvivis kun li, montras, ke en la lastaj tempoj li ne ĝuis plenan sanon, sed neniu povus imagi, ke li tiel frue lasus nin.

Giorgio Canuto naskiĝis en Torino la 3-an de Junio 1897-a. Doktoriĝinte pri medicino kaj juro li fariĝis asistanto de la fama profesoro Mario Carrara, kaj post ties morto li okupis lian lokon en la Universitato de Torino kaj poste li estis vokita al Parma.

En 1923-a li esperantistiĝis kaj de tiu dato flanke de siaj privataj aktivecoj li dediĉis parton de sia vivo al Esperanto.

Sur la profesia scienca kampo li estis mondkonata kaj respektata kaj liaj lecionoj estis plenaj de scio kaj simpleco propraj al la veraj saĝuloj.

Jen kelkaj ĉefaj datoj koncerne lian vivon:

1897 — la 3-an Junio: Naskiĝis en Torino Giorgio Canuto.

1920 — Li doktoriĝis pri medicino.

1924 — Li doktoriĝis pri juro.

1925 — Li interesiĝas pri Esperanto kaj komencis sian agadon sur tiu ĉi kampo.

1928 — Elektita vic-prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio.

1929 — Li gvidis la kurson ĉe Radio-Torino.

1932 — Li eklaboras kiel membro de la Reorganiza Komitato de U.E.A.

1938 — Rektoro de la Universitato de Parma.

1956 — Li atingas la difinitan katedran pri Jurmedicino kaj estas elektita, dum Universala Kongreso en Kopenhago, Prezidanto de U.E.A.

1960 — Sabaton, la 29-an de Oktobro, je la 13-a horo, en la aĝo de 63 jaroj subite forpasis pro kora infarkto prof. Giorgio Canuto.

D-ro Canuto estis membro de la Akademio de Esperanto.

Lia koro ĉiam batis por la altaj idealoj, sekve ankaŭ por Esperanto, kiu al li multon ŝuldas.

D-ro Canuto, kiu persone interkonatiĝis kun la nuna prezidanto de BEL dum la Universala Kongreso en Budapesto konstante montris amikan intereson pri la Movado en nia lando.

En la pasinta jaro, kiam aperis la brazila poŝtmarko memoriga pri la 100-jaro de Zamenhof, kiu estis unu el la tri eldonitoj de la diversaj registaroj por tiu celo, D-ro Canuto esprimis al BEL sian varman gratulon por la feliĉa sukceso.

D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, brazila Delegito ĉe la XXXIV Esperanta Kongreso de Esperanto, en Varsovio, partoprenante poste en la landa itala kongreso de Esperanto, estis kore akceptita de la prezidanto de U.E.A. kaj prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio, kiu varme lin salutis. La kliŝo sur la kovrilo montras D-ron Canuto kiu prezidas la Italan Kongreson, ĉe lia dekstro D-ron Azeredo Coutinho, dum salutparolado.

Omaĝe al la eminenta mortinto Brazila Esperantisto aperigas tiun historian aspekton. Brazila Esperanto-Ligo sincere kondolencas la familion de tiu nobla batalanto kaj nian Universalan Asocion, kiun li sindone kaj inteligente prezidis.

# XVII CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO

## 7-14 de OUTUBRO de 1961

**Pôrto Alegre — Rio Grande do Sul**

**DATA** — De acôrdo com a B.E.L., a C.O. escolheu a data de 7-14 de Outubro para a realização do Congresso. Durante êsse período o tempo é geralmente ameno, no que concerne tanto à temperatura como às chuvas.

**EXPOSIÇÃO** — A C.O. já conseguiu obter o apoio das instâncias oficiais, entre as quais o SETUR (Serviço Estadual de Turismo), que pôs à disposição um pavilhão no centro da cidade, para a exposição de material de Esperanto, que a C.O. tenciona apresentar ao público, no período de 1-15 de Outubro. A C.O. pede a todos os Esperantistas que possuam material digno de ser exposto queiram remetê-lo, por empréstimo, o mais breve possível, a fim de que possa ser classificado e ordenado com a necessária antecedência.

**INSCRIÇÃO COM ANTECEDÊNCIA** — A exemplo do que tem sido feito nos congressos anteriores, a C.O. está planejando incluir no programa uma série de excursões e representações folclóricas, para que os congressistas possam convenientemente tomar contacto com o povo gaúcho e sua cultura. Porém, para que a C.O. possa desenvolver, sem embaraços, os trabalhos de organização, torna-se necessário que todos os Esperantistas brasileiros, colaborando para o maior brilho do Congresso, enviem à C.O., o *mais breve possível,* a sua adesão, juntamente com as taxas de inscrição.

| | |
|---|---|
| Membro simples ....... | Cr$ 600,00 |
| Acompanhante ........ | " 300,00 |
| Cooperador ........... | " 200,00 |

O membro cooperador contribui para auxiliar o Congresso, mas não tem direito de participar dos trabalhos. Naturalmente, essas taxas são contribuições mínimas e quaisquer contribuições extras serão bemvindas.

As importâncias deverão ser remetidas, em cheque ou vale postal, ao tesoureiro Sr. ROMEU SOUZA, rua Andrade Neves, 155 — 4.º Andar.

**TEMÁRIO DO CONGRESSO** — De acôrdo com a proposta da C.O., a diretoria da B.E.L. aprovou o seguinte temário para o Congresso.

I — *Esperanto e cultura: a)* Esperversal; *b)* Esperanto como língua de ranto como instrumento de cultura unitradução; *c)* Esperanto e rádio; *d)* Esperanto e turismo; *e)* Uso do Esperanto pelas organizações culturais internacionais. II — *Esperanto como instrumento de desenvolvimento intelectual: a)* Esperanto como meio de enriquecer o pensamento; *b)* Literatura esperantista; *c)* Imprensa esperantista; *d)* Vocabulários técnicos; *e)* Esperanto como propedêutica para o estudo de línguas estrangeiras. III — *Esperanto como realizador da fraternidade e compreensão universais: a)* A idéia interna do Esperanto; *b)* Esperanto e as religiões; *c)* Esperanto como meio de despertar uma consciência supernacional; *d)* Atividade das organizações internacionais de Esperanto; *e)* Esperanto e Unesco. IV — *O ensino do Esperanto: a)* Esperanto nas escolas de grau elementar e médio; *b)* Esperanto nas escolas superiores; *c)* Cursos particulares de Esperanto; *d)* Métodos de ensino; *e)* Formação de professôres. V — *Sociedades e grupos esperantistas : a)* Como organizá-los; *b)* Como animá-los; *c)* Como devem orientar as informações sôbre o Esperanto; *d)* Como conseguir sócios; *e)* Como devem relacionar-se com a vida social da localidade.

As teses deverão satisfazer as prescrições a elas concernentes do regulamento oficial dos congressos entre as quais destacamos as seguintes:

*a)* devem consistir em três partes: exposição, crítica e conclusões *b)* ser escritas à máquina, com espaço duplo, em um único lado do papel; *c)* ter no mínimo 5 páginas e no máximo 10 páginas de papel almaço; *d)* ser de preferência redigidas em Esperanto; *e)* ser remetidas, em duplicata, à B.E.L. ou à C.O., no mínimo 60 dias antes do início do Congresso.

A C.O. está distribuindo aos esperantistas a Circular n.º 1.

**MEMORLIBRO PRI LA ZAMENHOF-JARO. Importantes e curiosos dados históricos. — Magníficos artigos sôbre as várias aplicações do Esperanto. Ricamente ilustrado e encadernado. Preço Cr$ 950,00**

# BRAZILA KRONIKO

## PERNAMBUCO

*Recife* — Associação Pernambucana de Esperanto presigis kartonan propagandilon, kun granda verda stelo kaj la vortoj: *"Conheça Esperanto, língua internacional"*.

## MINAS GERAIS

*Belo Horizonte* — Dank'al nia sindona samideano Episkopo João Cavati C. M., kreskas nia movado ĉe la katolikaj seminarioj. Lia laboro en la urbo Mariana ne estis vana; en la Gimnazio Dom Frei Manuel da Cruz li varbis 26 lernantojn, kaj 29 en la "Seminário Maior".

*Araguari* — Nia sam. Walter B. Lelis klopodas por fondi, kun la kunhelpo de tieaj kolegianoj, Esperanto-klubon. Bonan sukceson!

*Centralina* — La esperantista grupo "Centralina Esperanto-Klubo", fondita la 7-an de septembro 1960, enoficigis sian unuan estraron: Prez. Luiz Floresta Filho; vic-prez. José Batista Queiroz; 1-a sek. Eli de Oliveira; 2-a sek. Altamiro Honorato de Gouveia; 3-a sek. f-ino Neide Queiroz; kas. Milton Lúcio de Andrade; bibl. f-ino Agenir de Paula; pordecida komisiitaro: S-ino Sarah de Paula Floresta, Manoel Silvestre Ramos, Pedro José Rodrigues. Funkcias la Esperanto-kurso "Estevina Magalhães".

*Monte Santo de Minas* — Seminariana Esperantista Movado (SEMO) preparas feston pri la Zamenhoflingvo la 4-an de septembro, okaze de la unua datreveno de SEMO.

Aperis la dua numero de "Nia Revueto", eldono de SEMO, kies respondeca redaktoro estas Frato Severiano de Souza.

La Superuloj de Seminário Sacramentino B. Eymard decidis enkonduki Esperanton kiel devigan lernobjekton ĉe la Seminario.

## ŜTATO RIO DE JANEIRO

*Niterói* — La 12-an de septembro Niterói Esperanto-Klubo festis sian 13-an fondiĝan datrevenon. Okazis solena kunveno ĉe la aŭditorio de Conservatório de Música de Niterói, kun pluraj paroladoj kaj "Hora Lítero-Musical", kun la partopreno de la sopranulino Dalka Azevedo, de la maestrino Marlice Botelho Beleza kaj la gitaristo João Francisco.

*Petrópolis* — Du novaj Esperanto-kursoj instaliĝis en ĉi tiu urbo. Unu, ĉe União E. Allan Kardec, la 15-an de junio, laŭ la instigo de la societo "Mocidade Espírita Caibar Schutel", sub la gvido de inĝ. Bruno Kozlowski.

La duan kurson oni inaŭguris solene sub la prezido de nia ŝatata samideano José Varanda, ankaŭ sub la gvido de la veterana samideano Bruno Kozlowski, ĉe la Instituto Carlos A. Werneck, la 5-an de aŭgusto. Paroladis s-no Bruno, prof. Carlos Alberto Werneck, la sekretario de Brazila Klubo-Esperanto Hamilton Cunha Kozlowski, kiu legis belan mesaĝon de d-ro Carlos Domingues, prezidanto de BEL, kaj aliaj ĉeestantoj.

*São João de Meriti* — Kun 80 gelernantoj komenciĝis elementa E-kurso ĉe Ginásio Meritiense, Escola Técnica de Comércio kaj Grupo Escolar Judith de Castro. Ankaŭ estas fondita Meritiense E.-Grupo, kies adreso estas: Av. Operária 408.

## SÃO PAULO

*Birigui* — Nia samideanino Maria Eulália Vieira malfermis elementan E-kurson.

*Cruzeiro* — Nia sam. Sírio Silva, delegito de UEA, informis nin pri la fondo de esperantista grupo, kies unua estraro estas: Prez. prof-ino Suely Gerhard Teixeira; sek. Nelson dos Santos; kas. Iracema Wukhaizer.

*Lins* — S-ro Alvaro Queiroz Filho, prezidanto de Internaciaj Servadoj de Rotary Club presigis verketon, kiun li disdonas kiel propagandilon de Esperanto.

*Santo André* — Nia sindona kunlaboranto Cícero Pimentel gvidas etan lernejon de Esperanto. Li sciigis nin pri la loĝado, en São Paulo, de d-ro Kurt Dellian, nun kemiisto de la firma Hoechst, eksdirektoro de "Scienca Rondo" kaj eksdelegito de ISAE en Germanujo, unu el la aŭtoroj de Scienca kaj Teknika Terminaro.

*São José dos Campos* — Verda Stelo Esperanta Societo inaŭguris elementan E-kurson, kiu funkcias ĉe la Fakultato de Leĝoscienco sub la gvido de niaj samideanoj Alcyr Guedes de Almeida kaj Euripedes da Silva.

## PARANÁ

*Ponta Grossa* — Sub la direkto de nia samideano José Toniolo funkcias nova E-kurso, ĉe Centro Cultural Vieira de Alencar, ĉiusabate, vespere.

## SANTA CATARINA

*Joinville* — Centro Cultural Cruz e Souza ĉe la Kolegio Bom Jesus fondis "Clube de Esperanto" kaj starigis E-kurson, kies gvidanto estas prof. José Maria A. Gomes.

## RIO GRANDE DO SUL

*Uruguaiana* — Nia samideano Antônio de Pádua Soares sciigis nin pri la inaŭguro de elementaj E.-kursoj, gvidataj de li. Unu el ili funkcias ĉe avenuo Flores da Cunha, n-ro 1838. Alia, ĉe la Centro Espírita "Senda de Jesus". Tria, ĉe la Kolegio União, pere de Esperanto-Asocio de Uruguaiana.

La gazeto "A Fronteira" (Landlimo) presigis jam plurajn artikolojn pri nia internacia lingvo, verkitajn de Pádua Soares.

La 15-a de oktobro 1960 estas la dato de la fondiĝo de "Esperanto-Asocio de Uruguaiana". Estas elektita kaj enoficigita, por la periodo 1960-1961 la jena estraro: Prez. Anizio Azambuja (urba konsilanto); Vicprez. César Cascos Alonso; ĝen. sek. Antônio de Pádua Soares; 1-a sek. José A. F. Severo; kas. Saul Rosa de Lima; bibl. f-ino Vilma Antunes Goni.

Associação Uruguaianense de Esperanto (Esperanto-Asocio de Uruguaiana) jam aprobis sian Statuton, kies 5-a artikolo deklaras, ke ĉiuj AUE-anoj devige aliĝos al Brazila Esperanto-Ligo, pere de AUE.

## GOIÁS

*Goiânia* — Laŭ informo de nia laborema samideano C. Wutke, funkcias jam Goiânia Esperanto-Klubo, provizore ĉe s-ino Maria Antonieta Alessandri, prez. de la spirita centro "Tenda do Caminho", en kies gimnazio funkcias elementa E.-kurso.

**CURSO DE ESPERANTO POR CORRESPONDÊNCIA**

**Nos 3 graus — elementar, superior e magistral.**

**Para inscrição peçam informações.**

# NEKROLOGO



GIOVANNI P. FARACO

Kun profunda bedaŭro ni sciigas pri la morto de nia kara samideano Giovanni Pasqualini Faraco, en la 10-a de Novembro 1960 en Florianópolis.

Li lernis la lingvon kun la helpo de la historiista monaĥo Fr. Bertino Goerner CPF, rektoro de la Gimnazio de Porto União, Ŝtato Santa Catarina, en 1935, kaj de tiam fariĝis aktiva esperantisto. Lia ĉefa laborkampo estis la Esperantista Klubo de Florianópolis, de li fondita, la 9-an de Januaro 1943 kaj rekonita de la Ŝtata Registaro en 1947 kiel asocio de publika utileco. Kiel Prezidanto de tiu Grupo, li ĝin gvidis dum multaj jaroj kaj sukcesis interligi malnovajn esperantistojn kaj formi novajn samideanojn.

Altranga publika oficisto pri Statistiko, Delegito de U.E.A., instruisto en duagradaj lernejoj, Faraco ĉiam estis entuziasma laboranto.

Li reprezentis la ŝtatan Registaron en kelkaj Kongresoj, de Esperanto, en kiuj li partoprenis: São Paulo, Belo Horizonte, Niterói; en ĉi tiu lasta li zorgis pri la historio de la Esperanto-Movado en Santa Catarina.

Bona amiko de BEL, li sindone kaj lojale kunlaboris kun ni en pluraj okazoj. Pro lia forpaso ni sincere kondolencas lian familion

*Maria Luiza Bocayuva Jaguaribe de Mattos*

En Aŭgusto de la lasta jaro mortis en nia urbo S-ino Maria Luiza Bocayuva Jaguaribe de Mattos, kiu dum multaj jaroj sindone kaj brile laboris por nia afero.

Ĉar ŝi belege deklamis, ŝi aŭdiĝis kun grandaj aplaŭdoj en niaj solenaj kunvenoj; aparte memorinda estas ŝia impona deklamado de la Preĝo sub la Verda Standardo, kiun ĉiuj aŭskultis kun vera emocio, eĉ se oni ne sciis Esperanton.

En 1918, kiam, Esperanto estis instruata en trideko da unuagradaj komunumaj lernejoj, ŝi lernigis en la Lernejo Afonso Pena. Ŝi ricevis la Diplomon de Profesoro Aprobita en 1921. Dum la 7-a Brazila Kongreso de Esperanto, 1923, en la iama Teatro Trianon, ŝi faris en literatura kunveno elokventan paroladon pri la temo "Printempo kaj Saŭdado".

Ŝi estis sekretariino de "Brazila Klubo "Esperanto" kaj ankaŭ estraranino de la tiama "Virina Klubo".

Pro familia devo depost multaj jaroj ŝi ne plu partoprenis aktive en nia Movado, sed ŝi mem kaj ŝiaj samideanoj konservis bonan memoron pri la aktiveco dum longa tempo. Sincere ni kondolencas la familion de tiu kara samideanino.

*G. Atanasov*

Mortis la 13-an de junio 1960, en Sofio, nia elstara veterano Georgi Atanasov, naskita la 12-an de decem-

bro 1881. Li ellernis Esperanton en 1899. Tradukis la verkon de Th. Cart kaj Pagnier "L'Esperanto en dix leçons", verkis E.-muzikaĵojn, estis kunredaktoro de "Danubo" kaj kunlaborinto de "Rondiranto".

*Raphael Forni*

La 23-an de decembro 1960 mortis en la urbo São Lourenço, Minas Gerais, nia samideano Raphael Forni, kolonelo de Fajrestingista Brigado, malnova esperantisto. Nian kondolencon al lia vidvino.

*Valdemar Langlet*

La 16-an de oktobro 1960 mortis tiu sveda pioniro de Esperanto, verkisto, kunfondinto de E.-Klubo en Uppsala (1891) kaj de la revuo "Lingvo Internacia" (1895). Naskita la 17-an de decembro 1872, li edziĝis en 1899 kun la fervora finna esperantistino Signe Blomberg, kaj post ŝia morto en 1921 li denove edziĝis en 1925 kun alia esperantistino, Nina Borovko.


## ANTOLOGIAS

| | | |
|---|---|---|
| **Angla Antologio** .......... | **E.** | **950,00** |
| **Antologio de Brazilaj Rakontoj B 200,00** .......... | **E.** | **300,00** |
| **Antologio de Portugalaj Rakontoj B 300,00** .......... | **E.** | **400,00** |
| **Ĉeĥoslovaka Antologio** ..... | | **1.050,00** |
| **Ĉina Antologio** .......... | **E.** | **800,00** |
| **Esperanta Antologio B. 1.050,00** .......... | **E.** | **1.200,00** |
| **Estona Antologio** .......... | | **600,00** |
| **Kataluna Antologio** ........ | **E.** | **1.100,00** |
| **Sveda Antologio** .......... | **E.** | **1.250,00** |
| **Svisa Antologio** .......... | | **1.050,00** |


## *PAROLADO PRI ESPERANTO EN KLUBO CAIÇARAS*

Grandan sukceson atingis la parolado farita de la eminenta brazila verkisto J. C. Mello e Souza, okazinta la monaton oktobro en la grava klubo Caiçaras.

Prof. J. C. Mello e Souza, kies plumnomo estas Malba Tahan, parolis al la ĉeestantaro pri la historio de la internacia lingvo kaj ĝia evoluo ĝis Esperanto, montrante ĝian neceson en la diversaj branĉoj de la vivo.

Poste, lia frato, J. B. Mello e Souza parolis pri la simpleco de la gramatiko de Esperanto, kompare al tiu de la naciaj lingvoj, kaj post malgranda instruo ĉiuj kantis kanzonetojn en la internacia lingvo kaj per tio finiĝis la kunveno.

Post la parolado, la estraro de la Klubo regalis la ĉeestantojn per koktelo.

## *LASTAJ REVOJ*

La lastaj revoj longe jam foriĝis,
Dum senfoliaj mortis ĉiuj floroj;
Kaj de l' saŭdado tute parfumiĝis
L'animo, kiu nun vivas en ploroj.

Ĉiujn pasintojn mi neniam vidis,
Nek vivon, el kiu devenas sorto.
Ĉirkaŭ mi, malamikaj fortoj ridis
Pro la certeco pri venonta morto.

Tamen revoj kaj floroj jam velkintaj
Tra la mallumaj tempoj nun perditaj
Vivas ankoraŭ en la temp' survoje.

Ĝojo troviĝas nur ĉe la memoro:
Jen do la vera sort' de mia koro:
Vivi kaj plori... kanti kelkafoje...

*José Santana* (blindulo)

# ? LA MISTERO ROMANO

*Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Medeiros e Albuquerque kaj Viriato Correia.*

XLI

VAPORO EN LA KAPO

La sekvantan tagon, je la unua poŝtagmeze, Petro Albergaria tagmanĝis en la societo de Eneias Cabral. La okazaĵoj de la antaŭa nokto vekis en la unua helpdelegito grandan intereson pri la murdinto de Sanches Lobo.

La aresto de D-ro Mendes Guerreiro estis grandega venko por la Polico. Mendes Guerreiro estis unu el la plej elstaraj personoj en Rio, kies ĝistiama konduto ĉiuj prezentis kiel tute imitinda, interalie li estis prizorgito de kunfrataroj kun prestiĝio ĉe la katolikaro. Kaj la tutan bruan sukceson de la aresto, plenan de neatenditaĵoj, kiu interesis la Policon kaj la raportistaron, Eneias ŝuldis al Albergaria. Eneias do invitis lin por tagmanĝi en la unuaj horoj de tiu posttagmezo. Ili konsentis pri la renkontiĝo frumatene, kiam ili revenis de la mistera domo en Gavea.

En la invito de Eneias estis iu intenco, sed ĝis tiu momento, li mem ne sciis bone, kion li intencas. Albergaria interesis lin, sed pri tiu intereso li ne povis aserti ĉu ĝi estis nura impulso de danko por tiu polica triumfo aŭ ĉu pro aliaj motivoj, kiujn li mem ne povis difini. Estis vere, ke je la dua fojo li renkontis Albergarian en strangaj situacioj por la irado de la komplika proceso. Falis en la okulojn de ĉiuj la reciprokan korinklinon de tiu junulo kaj de F-ino Lucinda. Sed ĉu lia enmetiĝo en la irado de la faktoj estis nur pro amo?

Eneias havis grandan inklinon al la policaj aferoj kaj la granda sperto atingita per la esploro de la krimoj kaj de la krimuloj faris ke li neniam flankelasis ian ajn eron.

Alveninte al la restoracio, Eneias volis apartan ĉambron.

Oni destinis al ili ĉambron ĉe la malantaŭa parto, ĉarma loko en kiu la du amikoj povas paroli tute libere pri sekreta afero.

La kelnero sin prezentis.

— Kian vinon vi preferas, demandis Eneias al Albergaria.

— Dankon. Mi trinkas nenian vinon.

— Bieron?

— Ankaŭ ne.

— Ha! vi estas abstinema! Tio ne povas esti. Ĉi tie estas vino, kiu estas vere treege bona. Vi trinkos iom, kaj ĝi plaĉos al vi.

— Kelnero, la kutiman vinon.

La unuaj manĝaĵoj estis alportitaj kaj la vino kune.

— Gustumu, diris la delegito al sia gasto.

Albergaria trinkis pro ĝentileco.

— Treege bongusta, li diris poste.

— Eksterordinara.

Ili parolis pri la varmo, pri nedifinitaj aferoj. La kokinsupo estis manĝita.

— Ĉu ne plaĉis al vi la vino?

— Treege, Albergaria respondis.

— Se estas tiel, kial vi havas malplenan glason?

— La murdinto de Sanches Lobo denove plenigis la glason.

En la okuloj de Albergaria montriĝis la unuaj rezultoj de la vino: neordinara brilo, vivardeco, tiu bone konata luma esprimo, kiun ĉiuj montras ĉe la unuaj vaporoj de la alkoholo.

Eneias komencis paroli. Kaj post kelkaj minutoj da babilado:

— Kiu estas via vivrimedo, amiko?

— Nun mi estas senlabora.

— Ba! sed tio ne povas esti. La amikoj utilas en tiaj okazoj. Kial vi ne diris tiun al mi pli frue- Mi povas havigi al vi ion en la policejo.

— Mi estos al vi tre dankema.

— Ne, ne dankinde. Tio estas nur redono de servo. Permesu, ke mi parolu sencerimonie, ni ambaŭ estas junuloj.

— Kiel vi volos.

— Vi faris al mi grandan komplezon. Mi fariĝis preskaŭ freneza por eltrovi la ŝteliston de la testamento de Sanches Lobo, kaj subite vi indikis al mi D-ron Mendes Guerreiro. Kiu povus pensi tion! Mendes Guerreiro, persono konata kiel honesta kaj respektinda. Grandega sukceso! Ĉu la vino ne plaĉas al vi?

— Bonega! ekkris Albergaria trinkante denove.

— Kaj kiel vi pensas pri la agado de la Polico? La memmortigita Melo Bandeira malgraŭ siaj eraroj, sia manio pri la lanterno, sia manio pri la reklamo, havis ja polican inklinon. Estis domaĝo! Sed kion vi opinias pri nia agado? Ni estas farintaj feliĉan laboron, ĉu ne vere?

— Jes!

— Vi diras tiun "jes" tiel malvigle. Estu sincera.

— Ĉu vi ne koleras?

— Ne. Ni estas amikoj, bonaj amikoj.

Albergaria jam estis iom konfuzita pro la vino.

— Mi pensas, ke la Polico deflankiĝas de la ĝusta vojo.

— Fakte en la komenco ni iris iom sen direkto. Tio estas komprenebla. La krimo estis iom komplika.

— En la komenco kaj en ĉio, diris Albergaria kun maltimo, kiu ne estis lia sed venis de la alkoolo.

— Ne diru tion.

— Mi rediras, Mi ne kredas, ke Petro Link estas la murdinto de Sanches Lobo.

— Ho! tio estas troa! Nu, la viro konfesis! La ŝuoj trovitaj sur la marbordo estas liaj, la gantoj estas liaj kaj lia la letereto trovita de Melo Bandeira apud la monkesto de la bankiero.

La vivardeco de la okuloj de Albergaria iom post iom pli intensiĝis.

— Ha! tio signifas nenion, li respondis.

— Ĉu nenion? Ĝi estas ĉio.

— Kaj la ducent mil milrejsoj, la ducent mil milrejsojn kiujn la bankiero ricevis en la sama tago kiam...

Nedaŭra paleco vidiĝis sur lia vizaĝo. Li konfuziĝis, faligis la forkon. Eneias fikse rigardis lin.

— ...kiam oni mortigis lin? li konkludis.

— Ba! diris Eneias, la ducent mil milrejsoj estis ŝtelitaj de Petro Linck.

— Tute ne! diris Albergaria kun energio.

— Ĝi estas tiel klara kiel akvo. Se Petro Link asertas, ke li ne trovis la ducent mil milrejsojn, li tion faras pro intenco tute natura ĉe la ŝtelistoj. Li esperas esti absolvita por poste ĝui la monon. Vi certe konsentas, ke la Polico estis aginta kun bonŝanco.

Albergaria ridetis.

— Vi ridas! La eltrovo de la murdinto de Sanches Lobo estas laboro, kiu honorigus la policon en ia ajn parto de la mondo. Ĝi sukcesis detaligi ĉion. La agon de la murdinto kaj la agon de la viktimo, la horon de la krimo...

— La horo de la krimo! diris Albergaria moke.

— Certe. La krimo okazis je 11-a nokte.

— Ha! tute ne.

Eneias fikse rigardis lin. La okuloj de la junulo brilegis kun ne kutima brilo. La ebrieco kaptis lin.

— Ha! tion mi asertas! obstine diris la delegito.

— Ne, mi vetos.

— Kaj la horloĝo! Kaj la horloĝo, kiun oni trovis rompita sur la planko, montranta la dek-unuan.

La ridego de Albergaria en tiu momento evidentigis lian tutan ebriecon.

— Kaj ĉu iu povas aserti, ke la horloĝo montris la precizan horon de la krimo?

— La Polico, per la esploro farita en la loko. La horloĝo falis teren ĝuste kiam la murdanto luktis kun sia viktimo.

— Tamen ne estis lukto.

Li estis dirinta ion malkonvenan. Malgraŭ la ebrieco li komprenis, ke li povis sin kompromiti. En lia spirito fariĝis iom da lumo.

— Ne estis lukto. Petro Linck asertis, ke li ne luktis kun la viktimo.

— Kaj la afero pri la horloĝo, kiel vi ĝin klarigas, demandis Eneias.

— La murdinto haltigis ĝin je la 11-a kaj poste ĝin rompis.

Li komprenis, ke li estis treege malprudenta, kaj eksilentis.

— Kun kiu intenco? demandis Eneias.

Li ne respondis.

— Malsaĝulo.

Sajnis al Albergaria, ke lia silento povus veki suspekton kaj li parolis.

— Kun la intenco erarigi la policon.

— Tio estas tre transcenda. Li provus erarigi ĝin en iu alia afero sed ne en ĉi tiu. Pli bone vi povus diri, ke la horloĝo haltis je la 11-a matene. Tio povas esti. Sed la afero pri la horo, pli du aŭ malpli du ne gravas. Nur la rabo, la murdo, gravas. La murdinto de Sanches Lobo, ĉu Petro Linck ĉu iu alia, estas abomeninda.

— Kial?

— Ĉar li mortigis malkuraĝe kaj perfide. Li mortigis senhonorige por rabi.

— Ne! kriis la alia, stariĝante.

— Jes!

— Sanches Lobo estis fripono, friponego! impete ekkriis Albergaria.

— Li estis filantropo! interrompis Eneias.

— Li ĵetis mian familion en mizeron! kriegis la murdinto kun larmoj en la okuloj.

Eneias ege malfermis la okulojn kaj la buŝon. Silente li fikse rigardis Alber-

## ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

*BULGÁRIA* — O Conselho da cidade de Kubrat decidiu dar a denominação ESPERANTO a uma das ruas da cidade, em honra ao dr. Zamenhof.

*CHECOSLOVÁQUIA* — Em 127 escolas de diversos graus ensina-se o Esperanto a quarenta mil estudantes de ambos os sexos.

*CORÉIA* — Korea Esperanto-Asocio informa que a Rádio Pjeng-jang começou a transmitir em Esperanto, a começar da primeira quarta-feira dêste ano.

*ESPANHA* — A Feira Internacional de Amostras de Barcelona editou belo cartaz oficial em Esperanto, com desenho moderno em côres várias, em 2 formatos: 30x40 cm e 70x100 cm. Remessa grátis, mediante pedido a Feira Oficial e Internacional de Muestras — Negociado de Propaganda — Paseo de Maria Cristina, Barcelona — 4, Espanha.

*FRANÇA* — O ministro da Educação, Sr. Maurice Hercog, é favorável ao Esperanto, tendo duplicado a subvenção dada para nosso movimento.

*HOLANDA* — A editôra Elservier, que se especializou em editar vasta série de glossários científicos em várias línguas, anunciou para breve uma edição de dicionário de têrmos médicos "Questionarium Medicum", em 16 línguas, entre as quais o Esperanto.

*ISRAEL* — O boletim *Nia Ligilo*, da Liga Esperantista de Israel, noticia a fundação de vários cursos de Esperanto em Tel-Aviv, Haifa e Kfar-Ata. Nesta última cidade inaugurou-se em 13 de julho 1960 a rua Zamenhof. Com igual denominação existe uma rua, em Tel-Aviv.

*ITÁLIA* — A Biblioteca Pública de Bologna organizou uma seção especial de Esperanto, que conta com várias centenas de volumes na língua internacional. A secção é subvencionada pelo Ministério de Instrução Pública com trezentas mil liras.

*IUGOSLÁVIA* — Notícia de Belgrado informa que as estradas de ferro dêsse país resolveram usar a língua Esperanto, ao lado das línguas francesa e servo-croata, nos textos e esclarecimentos do plano horário oficial para 1960-1961.

O dr. Ivan Ribar, presidente do Parlamento iugoslavo, quando visitou a secção esperantista da Exposição Filatélica em Novi Sad, declarou-se muito favorável à língua internacional, acentuando que a mocidade deve aprender o Esperanto e corresponder por meio dêle, por achar nisso o mais eficaz remédio contra a desarmonia entre os povos.

*POLÔNIA* — Pela primeira vez as Estradas de Ferro Polonesas editaram planos e horários de viagem com informações também em Esperanto. Até agora só o faziam em francês, inglês, alemão e russo.

*ESPERANTO NA ÁSIA* — A idéia da língua internacional colhe crescente sucesso na Ásia. No Japão o ensino do Esperanto progride em vasta escala, nas Universidades e nos círculos intelectuais. Organizações esperantistas são fundadas na Indonésia, Vietnam, Coréia do Norte e do Sul, Índia. Órgãos de Esperanto editam-se em Semarang, Bombaím, Taego e Hanoi. Em Pequim, a luxuosa revista "El Popola Ĉinio" continua vitoriosa.

---

garia. Ĉi tiu ektimis pro la vortoj diritaj. Li sidiĝis. Nubo pasis antaŭ liaj okuloj.

Dum longa tempo ili restis silentaj.

Fine Albergaria ŝovis la glason al la ekstremaĵo de tablo kaj diris:

— Hm! jen mi ebria!

Eneias malŝtopis alian botelon da vino kaj plenigis lian glason.

— Tago tagon sekvas, sed ne similas. Ĉi tiu vino meritas oferon. Ĝi estas eksterordinara.

*Viriato Correia*

Tradukis Y

---

**A. Lópes Luna**

**ZAMENHOF — INICIADOR DO ESPERANTO**

| | Cr$ |
|---|---|
| **Em português (tr. Carlos Domingues)** | **160,00** |
| **enc.** | **250,00** |
| **No original espanhol** | **175,00** |
| **En italiano (tr. Simondetti)** | **200,00** |

# RECENZO

